

Eksteraj rilatoj de UEA


Kuraĝigaj progresoj en kontakto kun Unesko: D.R. Kongo kaj Korea Respubliko

ESTRARANA KOMUNIKO DE STEFANO KELLER, 2015 MAJO 18

Kadre de la jaro 'Montevideo 60' (vidu [en tiu paĝo](#) sub 'Konsciigo') estis sugestitaj kelkaj agadebloj por la esperanta movado. Inter tiuj estas gravaj la klopodoj realigi aŭ plilarĝigi la rilatojn kun Unesko kaj UN, en la formo de kunlaboro kun la landaj Unesko-komisionoj kaj UN-asocioj. Pretiĝis retpaĝo kun informoj pri kontaktebloj kun tiuj organizaĵoj tutmonde: <http://www.linguistic-rights.org/uea/mondaevoluo.html>




Laŭ tiuj konsideroj, pri kontaktoj kaj kunlaboro kun Unesko-komisionoj de la diversaj landoj, Demokrata Kongolanda Esperanto-Asocio (DKEA) organizis viziton de la loka Unesko-Komisiono en la oficejo de DKEA dum 2014. Sekve de tiuj kontaktoj la Komisiono por Unesko en D.R. Kongo [agnoskis](#) Demokratian Kongolandan Esperanto-Asociion, la landan asocion de UEA en julio 2014.



Ekde kelkaj monatoj okazas progresoj en la dialogo en Korea Respubliko inter la *Korea Nacia Komisiono por Unesko* kaj *Korea Esperanto-Asocio*.

En ĉi tiuj tagoj, estrarano de UEA, **LEE Jungkee**, kun la prezidento de *Korea Esperanto-Asocio*, **LEE Young-koo** kaj la prezidento de *Korea ILEI-sekcio*, **PARK Yongsung**



partoprenas la **Mondan Edukan Forumon 2015 de Unesko**, okazanta inter la 19a kaj 22a de majo 2015 en Incheon, KR. <http://ko.unesco.org/world-education-forum-2015/>



La evento estas spektebla per rekta videoelsendo el la forumejo:

<http://en.unesco.org/world-education-forum-2015/livestream>

tamen, pensu pri la [hor-zona diferenco](#) inter via loĝloko kaj la tiea, kvankam la rektaj elsendoj estas publikigitaj kiel registraĵoj kaj re-spekteblas en [tiu retpaĝo](#).

Fotoj: supre, maldekstre: reprezentantino el la Unesko-komisiono de DRK. Supre dekstre: Victor LUFIMPU LUKOLAMA (DKEA) alparolas la ĉeestantojn. Malsupre maldekstre : LEE Jungkee kun NRO-representanto en la Unesko-MEF-2015, Korea Respubliko. Dekstre : LEE Jungkee en la forumejo la 18an de majo 2015.

Sonregistraĵoj (Irina Bokova, Kailash Satyarthi) kaj rekta videoelsendo el la Monda Eduka Forumo:

<http://www.linguistic-rights.org/unesco/>